

Дмитрий Павлович Давыдов,

Gloro maro

tradukita de Frieder Weigold

Gloro maro, ho sankta Bajkal'!
 Gloro la ŝipo, la salma barelo!
 Inter ondegoj tra pluvada fal'
 Flosas fuĝinto en ŝelo.

Dum longa temp' kun raslanta ĉen'
 Migris mi en la montar' Akatuja.
 Nur pro amiko longtempa kaj ben'
 Ebliĝis libero tuja.

Ŝilka kaj Njerĉinsk, jam ĉesis terur'!
 Montgardistaron mi fine eskapis!
 En arbustar' min atendis sekur'.
 Kuglo pafila maltrafis.

Dum hela tago kaj densa mallum'
 Migris mi lande kaj for de la urboj.
 Homa koram' helpis min tra noktum'
 kaj tra mizeraj perturboj.

Gloro la maro, ho sankta Bajkal'!
 Mantel' ŝirita, ho gloro la velo!
 Inter ondegoj, tra pluvada fal'
 Flosas fuĝinto en ŝelo!

Traduko de la Rusa poeto "Славное море — священный Байкал" de Дмитрий Павлович Давыдов en Esperanton de Frieder Weigold.

Arg-959-1932 (2013-12-29 19:30:24)